

Lingva Komitato, prezentis unuan ŝkizon de kompara verko pri nia vortaro. La Lingva Komitato elektis por tio specialan komisionon, en kiu troviĝis, se mi ne eraras, S^o Christaller, Ellis, komandanto Matton, kaj aliaj. Helpita de sia amiko S^o Pujula, Huet elfinis sian laboron kaj prezentis la rezultatojn dum la Dresdena Kongreso al la komisiono, kiu ĝin akceptis. Kio fariĝis tiu tre interesa verko, kies presprovaĵon mi posedas, sed kiu neniam estis fine presita, mi ne scias. Kial, kvankam akceptita de la komisiono, ĝi malaperis?

Tuj post la kvara kongreso, Huet malsaniĝis, kaj de tiu tempo li nur malmulton povis fari.

Sentante sin ĉiam pli kaj pli malbone, li kun vera korpremo devis rezigni sian promeson fari vortarojn, kaj li mem petis, ke mi proponu tiun verkadon al S^o Grosjean-Maupin.

Tiel, dum la lastaj du jaroj de sia vivo, ĉiam malforta kaj malsana, li retiriĝis sur la kamparo. Antaŭ kelkaj monatoj mi kun ĝojo revidis lin. Li ŝajnis pli bone fartanta, li esperis, ke li povos repreni sian esperantistan vivon, kaj ni kune gaje faris projekt-ojn por la Antverpena kongreso! La kongresoj estis ja, por ni ambaŭ, tempo de amika kunvivado. En Boulogne, en Genève, en Cambridge, en Dresden, ni kunloĝis en la sama domo kaj, neniam disigante, ni kune vivis, kiel fratoj. Kiam, dum la unua kongreso, en 1905, mi, kalumniita, de multaj suspektita, travivis, meze de tiu bela triumfo de Esperanto, tiom da malĝojaj horoj, Huet estis por mi la fidela kunulo, kiu refortigis mian prematan koron, kiu konsolis kaj revigligis min. Tian veran, sinceran amikecon oni malofte renkontas en sia vivo. Ĝi estas netaksebla trezoro; des pli granda estas la doloro, kiam oni ĝin perdas.

CARLO BOURLET.

PAUL BERTHELOT

Letero de misiisto, venanta de Brazilo, sciigis al la Centra Oficejo la morton de nia juna samideano Paul Berthelot, okazintan la 2 de Novembro 1910 en Conceiçad de Araguaya. Li estis nur dudek-okjara!

La memoro de mia unua renkontiĝo kun Berthelot estas ankoraŭ

tute freŝa en mia spirito. En Julio 1901, — mi tiam estis kelkmonata Esperantisto, — mi iris al la kafejo « François I^{er} », kie kunvenis la malmultaj tiamaj parizaj grupanoj. Estis neniu. Mi sidis kaj atendis. Post duonhoru alvenis bruna junulo, kun longaj haroj, viglaj nigraj okuloj malantaŭ nazumo. Vidinte mian verdan stelon, li tuj, per torento da fluantaj paroloj, min alparolis esperante. Mi restis kvazaŭ ŝtonigita. Mi apenaŭ povis balbuti la lingvon, mi eĉ ofte min demandis, ĉu estas eble paroli Esperanton kun la sama facileco kaj rapideco, kiel nacian lingvon; kaj jen knabo, kiu subite forflugigis ĉiujn miajn dubetojn, kiu al mi pruvis, ke Esperanto estas *vivanta* lingvo.

Berthelot estis tiam jam kelkjara Esperantisto. Entuziasma kaj agema, li estis fondinta malgrandan klubon esperantistan en la liceo de Reims, kie li studis:

Pasis la libertempo. Kiam, en Oktobro 1901, mi revenis al mia klaso, mi kun plezuro ekvidis sur la unua benko mian junan samideanon. Malofte, dum mia jam longa profesorado, mi renkontis junulon pli inteligentan, sed ankaŭ pli fantazian. Li kun mirinda facileco lernis matematikon kaj cetere ĉion, kion li volis lerni. Sed li nur lernis tion, kio al li plaĉis; kaj neniu forto en la mondo, neniu rezono estus povinta lin devigi studi ion, eĉ necesegan, kio lin ne allogis. En Julio 1902 li prezentigis al la ekzameno por eniro en la Politeknikan lernejon. Mi tre esperis, ke, malgraŭ lia neregula laborado, li tamen, pro siaj grandaj kapabloj en matematiko, estos akceptita. Li senpene transpaŝis la unuan parton, sed dum la dua fina parto, en la ĉefa ekzameno pri matematiko, li vigle kontraŭdiskutis sian ekzameniston. Li cetere estis prava, kaj la ekzamenisto malprava. Tion malfacile oni pardonas al kandidato: Berthelot ne estis akceptita.

Li restis en Parizo, kie li vivis mi nescias per kiaj, tiom diversaj kiom lertaj, rimedoj. Lia scivolema spirito lin kondukis al plej malsamaj vojoj. Li samtempe sin okupis pri filatelio kaj pri moderna greka lingvo, pri matematiko kaj sanskrito, kaj ĉefe pri Esperanto. En tiu tempo li kunlaboris kun S^o Merckens por verki sub la kontrolado de S^o Cart la unuan vortareton francan-esperantan, kiu aperis, en 1903, ĉe la firmo Hachette.

Sed, ho ve! Paul Berthelot malsaniĝis. Lin kaptis la tuberklozo. Li devis forlasi Parizon por pli dolĉa klimato. Malriĉa, preskaŭ tute sola en la vivo, ĉar li havis nur sian patrinon, kiu ne povis lin helpi, Berthelot estis elturnigema. Li dungigis sin, kiel kompost-

iston, ĉe presisto, en Céret, malgranda urbo en la Sudo de Francujo. Tie li laboris nur sufiĉe por gajni la monon necesan al sia tre simpla vivo, li rebonigis sian fartan en la pura aero de la Pireneoj, kaj la reston de sia tempo li dediĉis al sia amata Esperanto. Dum tiu tempo li verkis, en kunlaborado kun profesoro Lambert el Dijon, la « Komercaj leteroj », eldonitajn ĉe Hachette, kaj ankaŭ tre interesan studon pri Fonetiko, kiun li mem presis, kaj kiun li subskribis per pseŭdonimo « Marcelo Verema ».

De Céret Berthelot skribis al mi multegajn leterojn. Lia bolanta cerbo ĉiutage elpensis novan planon, kiun li submetis al mia juĝo. Li faris projektojn de akcia societo, de novaj libroj, de propagandiloj, de gazetoj. Mi ankoraŭ posedas tiun amason da dokumentoj, ofte de li mem *presitaj*, por ke li povu ilin dissendi pli oportune, kaj en kiuj dismontriĝas la fekundeco de lia elpensema, sed ofte utopia, imago. Fine li decidis fondi novan propagandan gazeton dusemajnan, kaj li al mi proponis la ĉefredaktorecon. Mi lin mone helpis, sed mi ne akceptis fariĝi ĉefredaktoro kaj konsilis, ke li sin turnu al nia fervora samideano Profesoro Lambert. Mi ja estis jam tiam « suspektinda » viro, kaj mi timis, ke mia nomo malhelpos lian entreprenon.

Tiel naskiĝis en Junio 1905 la gazeto « Esperanto » ĉefredaktita en Dijon de profesoro Lambert, presita kaj eldonita en Céret de Paul Berthelot. En la unua tempo la nova ĵurnalo sufiĉe kontentige sukcesis. Sed en finiĝo de 1905 okazis akcidento! Profesoro Lambert kaj Berthelot insiste petis, ke mi verku ĉefartikolon por la lastjara numero. En tiu artikolo, titolita « Organisons la victoire » (ni organizu la venkon), mi resumis la pasintajn progresojn, kaj mi faris proponojn por reorganizo de niaj fortoj. Mi esprimis mian bedaŭron, ke la unua kongreso ne realigis la projekton de nia Majstro pri Internacia Ligo, mi esprimis la deziron, ke niaj propagandaj societoj grupiĝu ĉirkaŭ la ĵusfondita « Centra Oficejo ». Aliflanke mi prezentis ĝeneralan projekton por reorganizo de niaj naciaj Societoj laŭ federacia plano kaj por racia divido de la taskoj inter niaj gazetoj. La artikolo ne entenis unu malagrablan vorton por iu ajn; ĝi elmetis nur ĝeneralajn ideojn (kiuj cetere nuntempe estas ĉie aplikataj). Se iu scivolema samideano nun relegus tiun pecon, li vane serĉus, kio en ĝi povus naski disputojn. Sed ŝajnis, ke ia malbona sorto pendis super ĉiuj miaj eĉ plej senkulpaĵoj: mi estis « suspektinda » viro, kaj « kaŝitajn glavojn » oni eltrovis ĉiam apud mi! Nepriskribebla eksplodo de malkontenteco okazis.

Berthelot, en unu el siaj spritaj leteroj, skribis al mi : « Votre article *fait fureur* de toutes façons » ; kaj per tiu franca vortludo li aludis, ke unuflanke la numero entenanta mian artikolon tre multe aĉetigis, sed ke aliflanke ĝi naskis furorojn de personoj, kiuj *imagis*, ke mi ilin atakis. Tio fariĝis vera milito. Berthelot estis tro lojala kaj verama viro por min riproĉi; kontraŭe tiuj nemerititaj atakoj pliigis lian simpation al mi kaj pli forte korligis lin al mi. Sed lia ĵurnalo tre suferis pro tiuj neatenditaj disputoj.

Por ĝin revigligi li, en 1906, du monatojn antaŭ la dua kongreso, transloĝis al Genève, kie li ageme helpis niajn svisajn samideanojn. Malgraŭ ĉio, li ne sukcesis remeti sian gazeton en bonan vojon. Post la kongreso, li transdonis ĝin al S^o de Saussure kaj al S^o Hodler, kiu ĝin ankoraŭ nun lerte direktas; kaj li forvojaĝis.

De Portugalujo li skribis al mi leteron por sciigi sian decidon marveturi al Brazilo, kaj li sendis al mi verkon esperantan, tradukon de la komedio « Fantasio » de Musset. Mi ĝin zorge konservis, kaj mi ĝin publikigos baldaŭ en la Kolekto de La Revuo en memoro de tiu inteligenta, iom revema kaj utopiema, sed nobla junulo.

En Brazilo li daŭrigis sian esperantan apostoladon, sed tie lin kaptis la politiko. Li sin okupis pri socialismo.

En 1909, kelkajn tagojn antaŭ mia forveturo al Barcelono, mi ricevis de li lastan kortuŝigan leteron. Ĝi estis kvazaŭ adiaŭo al la mondo, al la vivo. Li sciigis al mi, ke li foriras kun kelkaj kunuloj en sovaĝan parton de la fundo de Brazilo por tie fondi socialistan kolonion. Li skribis : « Vi verŝajne ne revidos min, ĉar de tie, kien mi iras, neniu ankoraŭ revenis! »

Kaj li ne revenis.

Kio okazis al li en tiuj vastaj stepoj, aŭ arbaroj aŭ montoj senhomaj? Ĉu, meze de la granda Naturo, lia sentema animo impresigis? Ĉu, malfortiginte kaj premate de la grandiozeco de la izoleco, li, la malfeliĉa orfo sen familio, sopiris al eterna feliĉo? La dia graco lin trafis, kaj la iama senkreda liberpensulo mortis pie, kiel sankta kristano.

Jen ankoraŭ lojala amiko, kiun mi perdis! Jen ankoraŭ sincera Esperantisto, kiu malaperis!

CARLO BOURLET.